

Unua aliro al la uzo de interjekcioj en Esperanto

Fabio Fortes

UNIVERSIDADE FEDERAL DE JUIZ DE FORA
BRAZILIO

fabio.fortes@ufjf.br

Abstract

Interjections are a class of words found across all natural languages. Their use relates to the expression of mental states or speech acts within the discursive context. Although they are relatively common in natural languages, they represent a class of words that are poorly integrated into the grammar, and therefore, are theoretically less predictable as linguistic elements for planned languages such as Esperanto. In this article, I propose to analyze the use of some interjections in Esperanto. The aim is to understand how competent speakers of this language employ interjections. For this, in the first part I review the literature on the linguistic aspects of interjections, in comparison with the Esperanto grammatical tradition; then I analyze the data related to the use of these words by competent speakers, which I obtained through the application of a survey specially designed for this purpose, which is also described in this article.

1. Enkonduko

Interjekcio estas aparta vortospeco troviĝanta en naturaj lingvoj. La uzo de interjekcioj ligiĝas al la komunikado, kiel maniero esprimi sentojn, emociojn, reagojn kaj sintenojn de la parolanto. Krom esprimi tiujn psikajn statojn, interjekcioj ankaŭ efikas sur la pragmatika kaj komunika situacio, ĉar per ili la parolanto povas montri ankaŭ komprenon, malkomprenon, dubon, heziton, atentigon, instigon kaj aliajn parol-agojn rilate al la komunikado mem, kaj al la kunparolanto.

Ĝenerale, la uzo de interjekcioj igas la parolon pli viveca, pli nuanca aŭ pli klara el la komunika vidpunkto (Ameka 1992; 2006; Wierzbicka 1992). En pluraj lingvoj, ekzemple, interjekcioj povas esprimi emociojn tiel, kiel malŝaton – kiel, ekzemple, per la angla *youk!* kaj *ugh!*; la germana *pfui!*; la pola *fu!*; la portugala *eca!*; kaj parolagojn kiel adiaŭon – kiel, ekzemple, la franca *allez!*; la esperanta *ĝis!*; la angla *see you!*; fivortojn – kiel ekzemple la franca *sacredieu!*; la portugala *droga!*; la germana *Scheiße!*; atentigon – kiel ekzemple la portugala *ei!*; la angla *hey!* kaj plurajn aliajn aferojn (Ameka 2006).

Per tiu eseo, mi intencas analizi la uzon de kelkaj interjekcioj en Esperanto. Mi celas kompreni kiel kompetentaj E-parolantoj uzas interjekciojn esprimantaj animstatojn, montrante sentojn kaj reagojn (malĝojon, ekmiron, riproĉon), kaj havantaj komunikajn aŭ pragmatikajn funkciojn en la parolo (tiel, kiel atentigon, instigon, ekkomprenon, heziton, konsenton, malkonsenton). Tiucele, en la unua parto mi prezentas kelkajn lingvistikajn rimarkojn pri tiu vortspeco kaj pritraktas la tradician gramatikan priskribon en Esperanto pri interjekcioj (laŭ *PAG* kaj *PMEG*¹). Sekve, mi analizas kelkajn eltrovojn pri la fakta uzo de tiuj vortoj en la E-komunumo, kiujn mi akiris per kontribuoj de diversaj partoprenantoj de la E-komunumo al la speciala enketilo kiun mi ellaboris tiucele.

2. Interjekcioj: karakterizoj, klasifiko kaj gramatika priskribo

Kiel sugestas la etimologio (el Latino, *inter-iecto*: “ĵeti en la mezon”), interjekcioj estas plejofte metitaj ene de la frazo aŭ diskurso, kvazaŭ sendependaj vortoj. Tiusence, ili ne konsistigas propradire frazelementon, integriĝantan al frazsintakso, sed memstaran eron (Poggi 2009: 186; Neves 2018: 1124). Laŭ la formo, interjekcioj povas esti simplaj sensencaj sonĉenoj (kiel ekzemple: *aĥ, ve, fi, ho, he*), onomatopeo (kiel ekzemple: *miaŭ!, glut, glut!, tin tin!*), ordinaraj vortoj aŭ radikoj elparolataj ekkrie (kiel ekzemple: *ek! for! help!*) kaj eĉ frazoj elparolataj ekkrie (ekzemple: *Dio benu!, Dank'al Dio!*). Interjekcioj ne integriĝas al la frazsintakso kaj plejofte ne akceptas fleksiojn, sufiksojn nek prefiksojn; ili estas plejofte nur unumorfemaj elementoj. Pro tiuj apartaj morfologiaj trajtoj, interjekcioj estas foje konsiderataj ne-vortoj, eĉ “anomia klaso” (Ameka 2006: 743).

Interjekcioj estas lingvo-elementoj forte dependaj de la lingva kaj eksterlingva kunteksto. Pro tio, ili ĝenerale ne havas tute stabilan signifon, sed estas nur komprenataj depende de la komunika situacio, kaj de aliaj kulturaj elementoj. Faktoroj kiel la intonacio kaj la komunika situacio aparte gravas por la difino de la signifo de interjekcioj. Do, unu sama interjekcio povas komprenigi plurajn signifojn, kaj pluraj povas esti uzataj por similaj sencoj (Neves 2018: 1126). Ankaŭ metalingvaj elementoj kiel gestoj kaj vizaĝesprimoj estas gravaj por la kompreno de la ĝusta signifo de iu interjekcio (Ameka 2006: 743). Iu sama interjekcio, ekzemple, *aha*, povas indiki simplan konstaton aŭ ironion.

Tamen, laŭ la semantika kaj pragmatika valoro, interjekcioj povas esti klasigitaj en du grupoj tra la lingvoj, nome:

¹ Mallongigoj por *Plena Analiza Gramatiko*, de Kalocsay kaj Waringhien (1980), kaj *Plena Manlibro pri Esperanta Gramatiko*, de Wennergren (2020).

1. **interjekcioj kiuj esprimas animstatojn** (ekmiron, ĝojon, malĝojon, doloron, aprobon, kuraĝigon k.a.);
2. **interjekcioj kiuj esprimas parol-agojn**, t.e. sintenojn de la parolanto antaŭ la diskurso aŭ la pragmatika kunteksto (atentigon, saluton, alvokon, heziton, malkomprenon, konsenton, malkonsenton, k.a.).

Kalocsay kaj Waringhien (1980) klasigas la esperantajn interjekciojn kiel a) alvokaj interjekcioj; b) forpelaj interjekcioj; c) instigaj interjekcioj; ĉ) sentesprimaj interjekcioj kaj d) onomatopeoj. Wennergren (2020), dividas ilin en a) oficialaj ekkriaj vortetoj; b) ordinaraj radikoj kiel ekkriaj vortetoj; c) neoficialaj ekkriaj vortetoj. Oni konstatas do, ke dum *PAG* klasifikas la interjekciojn laŭ iliaj pragmatiko kaj semantiko, *PMEG* klasifikas ilin laŭ la origino kaj morfologio.

Kelkaj lingvistoj aldonas la onomatopeojn al la interjekcia grupo; tamen, tiu grupo ne estas propradire interjekcioj, ĉar ili estas pli priskribaj vortoj ol esprimivaj vortoj (Ameka 2006: 743). Krom tio, onomatopeoj ne obeas ĉiujn aliajn formalajn, semantikajn kaj pragmatikajn trajtojn de interjekcioj.

En la Tabeloj 1 kaj 2 sube, mi sintezas la informojn pri interjekcioj trovataj ĉe *PAG* kaj *PMEG*, laŭ la semantika/pragmatika klasifiko²:

INTERJEKCIOJ ESPRIMANTAJ ANIMSTATOJN	
<i>PAG</i>	<i>PMEG</i>
<ul style="list-style-type: none"> ▪ doloro, sufero: <i>aj!</i>; <i>aj, aj!</i>; <i>huj!</i>; <i>aŭ!</i>, <i>ve!</i>; ▪ ekmiro, surprizo: <i>ha!</i>, <i>oho!</i> ▪ ĝojo, aprobo, entuziasmo: <i>hura!</i> ▪ ironio: <i>ha ha!</i> ▪ konfuziteco: <i>be!</i> ▪ laciĝo: <i>fu!</i>; <i>uff!</i>, <i>uff-uff!</i> ▪ malĝojo, abomeno, mallaŭdo, bedaŭro: <i>fi!</i>, <i>ve!</i>, <i>oj!</i> ▪ nekredemo: <i>ba!</i> ▪ rido: <i>ha ha!</i> ▪ viva sento: <i>ho!</i> 	<ul style="list-style-type: none"> ▪ doloro, sufero: <i>ve!</i>, <i>aj!</i>, <i>aŭ!</i> ▪ ekmiro, surprizo: <i>ha!</i>; <i>nu!</i>; <i>oho!</i> ▪ ĝojo, aprobo, entuziasmo: <i>hura!</i> ▪ konfuziteco: <i>be!</i> ▪ malĝojo, abomeno, mallaŭdo, bedaŭro: <i>fi!</i>, <i>aĥ!</i>; <i>oj!</i> ▪ malpacienco: <i>nu!</i> ▪ rezignacio: <i>nu!</i> ▪ rido: <i>ha ha!</i> ▪ senzorgeco: <i>ba!</i>; <i>baf!</i> ▪ viva sento: <i>ho!</i>

Tabelo 1. Interjekcioj esprimantaj animstatojn en Esperanto laŭ *PAG* kaj *PMEG*

² Pro tio, ke mi konsideras tiun klasifikon, mi intence forigas el tiu sintezo la onomatopeojn, kiuj korespondas al alia aparta grupo, kiun ne koncernas tiu eseo.

INTERJEKCIOJ ESPRIMANTAJ PAROL-AGOJN	
PAG	PMEG
<ul style="list-style-type: none"> ▪ alvoko: <i>hola!; ho he!; ho vi! ha lo!</i> ▪ atentigo: <i>he!, he ho!, hej!; hej ho!</i> ▪ dubo, hezito: <i>hum</i> ▪ ekkompreno: <i>ehe</i> ▪ ekrimarko; konstato: <i>aha</i> ▪ fino de interparolo: <i>nu</i> ▪ forpelo: <i>for!</i> ▪ haltigo: <i>halt'!</i> ▪ helpopeto: <i>help!, helpu!</i> ▪ instigo al parolo: <i>nu</i> ▪ instigo, kuraĝigo: <i>ek!; hej!</i> ▪ laŭdo: <i>bis!</i> ▪ malaprobo: <i>ej!</i> ▪ silentigo: <i>ĉit!; ŝŝ!; ts!</i> 	<ul style="list-style-type: none"> ▪ alvoko: <i>ha lo!</i> ▪ dubo, hezito: <i>nu, hmm</i> ▪ ekkompreno: <i>ehe</i> ▪ ekrimarko, konstato: <i>aha</i> ▪ fino de interparolo: <i>nu</i> ▪ konsento: <i>nu!; o kejl!</i> ▪ haltigo: <i>halt'!</i> ▪ helpopeto: <i>help!</i> ▪ instigo, kuraĝigo: <i>ek!, hej!</i> ▪ klarigo: <i>nu</i> ▪ laŭdo: <i>bis!</i>

Tabelo 2. Interjekcioj esprimantaj parol-agojn en Esperanto laŭ PAG kaj PMEG

Kiel oni konstatas, la priskribo de *PAG* kaj *PMEG* diferenciĝas nur per kelkaj detaloj. Ambaŭ baziĝas sur ekzemploj ĉerpitaj el literaturaj – ĉefe klasikaj – verkoj. Pro tio, la gramatika priskribo en Esperanto eble spegulas iun normon pri la lingvo, aŭ apartan kleran uzon, ne nepre koincidan kun la reala kaj aktuala uzado de interjekcioj en nuntempa Esperanto. Por kontroli la faktan uzon, estus necese disvolvi instrumenton ebligantan mezuri kaj priskribi kiel kompetentaj parolantoj uzas tiujn vortetojn. Per tiu instrumento, oni povus kompreni kiomgrade la aktuala uzado de interjekcioj spegulas la gramatikan normon. Krom tio, oni povus akiri ankaŭ aliajn informojn pri la kutimoj kaj la sentoj de esperantlingvanoj antaŭ la uzado de interjekcioj. Konsiderante tion, mi ellaboris specialan enketilon per *GoogleForms*, kaj petis ke kompetentaj E-parolantoj el pluraj landoj respondu ĝin.


3. La enketilo pri la uzo de interjekcioj: metodologio, celo kaj celogrupo

La enketilo celas akiri informojn pri interjekcioj esprimantaj animstatojn kaj parol-agojn. El tiuj du grupoj, mi elektis la jenajn ideojn:

Animstatoj	Parol-agoj
<ul style="list-style-type: none"> ▪ doloro, sufero ▪ ekiro, surprizo ▪ naŭzo, malĝojo, enuo ▪ riproĉo, malŝato 	<ul style="list-style-type: none"> ▪ ekkompreno ▪ atentigo/alvoko ▪ konsento/malkonsento ▪ instigo ▪ hezito, dubo

Tabelo 3. Signifoj de interjekcioj laŭ la kunteksto en la enketilo

Por ĉiuj ideoj supre, mi kreis kuntekston per dialogo en Esperanto kun helpo de klariga bildo. La respondanto devas elekti unu el 4 opcioj. Tie troviĝis du elekteblaj interjekcioj: tiu indikata per la gramatika priskribo (laŭ PAG), kaj alia kun signifo pli ĝenerala aŭ malpli preciza por la kunteksto. La tria opcio estis akcepti ambaŭ interjekciojn, kaj la kvara opcio estis indiki alian pli bonan interjekcion. Sube ni trovas bildon pri la enketilo, montrante paĝon en la ekrano kie ni trovas demandon pri la uzo de la tipa interjekcio *aj*, *aj!* por la ideo de doloro:



Bildo 1. Demando pri interjekcio esprimanta doloron en Esperanto, laŭ la enketilo por tiu esploro

Per tiu rimedo, mi esperis respondi al la demandoj: 1. Ĉu la gramatika priskribo kongruas kun la lingvouzo de la parolantoj? 2. Ĉu la parolantoj uzas kohere interjekciojn? 3. Kiuj aliaj interjekcioj estas uzataj, kaj kiel diverse krom tiuj priskribataj per E-gramatiko? 4. Se sufiĉe da uzantoj respondas al la enketilo, ĉu tiuj respondoj sugestas stabilan aŭ malpli stabilan uzadon de tiu vortoklaso?

Krom tiuj demandoj pri la uzo de apartaj interjekcioj, mi proponis ankaŭ kelkajn aliajn demandojn pri la profilo de la respondanto, kaj pri ilia lingvosento antaŭ la uzado de

interjekcioj. Tiuj lastaj demandoj ebligas kontroli la celogrupon kaj akiri aliajn informojn pri la uzo de la lingvo mem kaj de interjekcioj.

La enketilo estis dissendita per ret-mesaĝo al la studentoj de la grupo de Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM/2021-24, kaj al la aliĝintoj de la ret-listo “Nova Universitato” (*universitato@groups.io*), kiu kunigas plurajn universitatajn docentojn, esploristojn kaj profesorojn de la E-komunumo. Entute, respondis 67 partoprenantoj, el kiuj, 11 deklaris paroli la anglan kiel gepatran lingvon; 11 la italan; 7 la rusan; 6 la hispanan; 5 la francan; 4 la polan; 3 la portugalan; 3 la hungaran; 3 la ĉeĥan; 2 la germanan; 2 la rumanan; 2 la nederlandan; 1 la danan; 1 la indonezian; 1 la korean; 1 la ĉinan; 1 la serban; 1 la turkan; 2 enketitoj ne respondis pri tiu demando. Oni ne demandis pri iliaj landoj, sed la vario de gepatraj lingvoj sugestas, ke oni havis kontribuantojn el pluraj partoj de la mondo, sed ĉefe el Eŭropo.

Demandite pri la lingvo nivelo, 64,2% konsideris regi la lingvon je la nivelo C1 (*aŭtonomeco*), kaj 29,9 je la nivelo B2 (*flugo*). Malgraŭ tio, ke oni celis kompetentajn uzantojn, 6% respondis posedi la lingvon je la nivelo B1 (*salto*). Por tiu demando, mi uzis la klasifikon laŭ la Komuna Referenckadro por Lingvoj (2007), kaj ne inkluzivis la nivelon C2 (ankoraŭ ne oficiale mezurita per ekzamenoj en Esperantio okaze de la dissendo de tiu enketilo³). Tamen, oni inkluzivis A1-A2 nivelojn, ĉar estas ege komune ke Esperantistoj konsideras sin kiel “komencantojn”. El tiuj pli bazaj niveloj, mi ne havis respondintojn. Tiu rezulto kontentigas la postulojn de la esploro, ĉar la ideo estis ke sufiĉe bonaj uzantoj de la lingvo respondu la enketilon.

Ankoraŭ pri la profilo de la respondintoj, mi demandis ankaŭ kiucele ili uzas la lingvon kaj kiom ofte. Tiu demando gravas, ĉar interjekcioj estas vortoj ĉefe uzataj en buŝaj interŝanĝoj, kaj okazas el sufiĉe ofta kaj regula uzado de la lingvo. Por tiu demando, la plejparto 62% deklaris uzi E-on ĉefe skribe (43,1% por skribaj interŝanĝoj kaj 18,9% por legado); nur 20% deklaris uzi E-on ĉefe por parolaj interŝanĝoj kaj 12% deklaris uzi E-on egale por parolaj kaj skribaj interŝanĝoj. Aliaj 6% informis aliajn uzojn (verkadon, instruadon, ciferigadon, familian vivon, pensadon, aŭskultadon de E-radio). Tiu demando montras, ke la la uzado de Esperanto daŭre estas ĉefe skriba, kvankam konsiderinda nombro da uzantoj (32%) uzas ĝin ankaŭ por parolaj interŝanĝoj. Tio eble spegulas la historian tendencon de la lingvo mem (unue konata, disvastigata kaj uzata skribe, nur poste uzata por buŝa komunikado), kaj eble efikas sur la uzado de interjekcioj mem, kiuj okazas ĉefe dum parolaj, spontaneaj interŝanĝoj.

Tamen, demandite pri la ofteco de la uzo de la lingvo, la plejparto respondis uzi E-on tre ofte (preskaŭ ĉiutage, 62,1%) aŭ sufiĉe ofte (kelkajn fojojn dum la semajno, 19,7%). Nur 18,1% respondis, ke ili uzas la lingvon malpli ofte (almenaŭ unu fojon dum la semajno, 10,6%),

³ Sed jam baldaŭ mezurebla per Ekzameno kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

malofte (kelkajn fojojn dum la monato, 4,5%) kaj tre malofte (kelkajn fojojn dum la jaro, 3%). La averaĝa lingvo-uzo estas do sufiĉe ofta kaj kutima.

El tiuj informoj oni konstatas, ke la tipa esperant-parolanto respondinta la enketilon estas denaska parolanto de Eŭropa lingvo, havas la nivelon C1 en Esperanto, uzas la lingvon ĉefe por skribaj interŝanĝoj, kaj uzas ĝin preskaŭ ĉiutage. Tiu profilo estas kontentiga por la celo de tiu esploro.

4. La uzo de interjekcioj: kion montras la enketo?

Kiel oni klarigis supre, la demandoj pri la uzado de specifaj interjekcioj konsideris la du tipojn: interjekciojn esprimantajn animstatojn (ekmiron, doloron/suferon, malĝojon/enuon, riproĉon/malŝaton) kaj parol-agojn de la parolanto (atentigon/alvokon, instigon, ekkomprenon, konsenton/malkonsenton, heziton/dubon).

1. Interjekcioj por esprimo de animstatoj

Koncerne la ideon de **ekmiro**, la plej tipa interjekcio (*ha!*) estis elektita de 33,3% da enketitoj, dum 20,6% elektis la malpli precizan interjekcion (*aha!*) kaj 42,9% preferis indiki alian interjekcion (nome: *ah!*, *aĥ!*, *ĉu?*, *ĉu vere?*, *damne!*, *grandioze!*, *ho!*, *oho!*, *huaŭ!*, *bonege!*, *nekredeble!*, *vav!*, *vaŭ!*, *ŭaŭ!*, *wauu!*). La fakto, ke la plejparto preferis indiki alian interjekcion, indikas, ke eble la tipa interjekcio por ekmiro ne estas plu konsiderata tiel esprimiva kiel la sugestoj. Inter la sugestoj, troviĝas esperantaj adverboj (*bonege*, *nekredeble*, *damne*, *grandioze*), variantoj de *ho!* kaj variantoj de *ŭaŭ!*. Tiu lasta vorteto ne troviĝas en PAG nek en PMEG kaj ŝajnas veni el fremda lingvo, eĉ aperanta foje per literoj fremdaj al Esperanto (*wauu*).

Koncerne la ideon de **doloro/sufero**, tamen, la tipa *aj*, *aj!* estis la interjekcio plejofte elektita (62,7%), la malpreciza *huj!* estis elektita de nur 9% da respondintoj, kaj 23,9% preferis indiki aliajn formojn. Inter tiuj ĉi lastaj, oni sugestis: *aŭ* kaj *oj* (eble variantoj de *aj!*), *ve!*, *ho ve!*, *aha!*, kaj la adverboj *certe* kaj *jes* (eble pro miskompreno: anstataŭ doloron, oni eble komprenis konsenton). Ĉiuokaze, okulfrapas la fakto, ke la plejmulto fakte agnoskas la klasikan *aj aj!* kiel la tipan/norman interjekcion pri doloro/sufero.

Rilate **malĝojon/enuon**, ankaŭ la tipa *ve!* estis la plej elektita (de 43,9% da respondoj), sed grava nombro da enketitoj akceptis la malprecizan *aĥ!* (18,2%), aŭ ambaŭ (25,8%). Nur 12,1%

de la respondintoj preferis indiki aliajn (nome, *pff!*, *ho!*, *ho ve!*, *fi!*, *hohoho!*, *merd'!*, *oĥ!*, *hu!*, *ĥo!*). Inter la sugestoj, pluraj ne troveblas en tradicia gramatika priskribo, kaj ŝajnas speguli kutimojn ankoraŭ ne ĝeneraligitajn en la lingvo, aŭ eble kontribuojn el la denaska lingvo.

Laste, pri la ideo de **riproĉo/malŝato**, la plej tipa interjekcio *fi!* estis elektita de 71% da respondintoj. Tamen, la signifa kvanto de 19,4% preferis indiki aliajn formojn (nome: *bedaŭrinde*, *damne*, *efektive ve*, *jes*, *ho*, *ho ve*, *malfeliĉe*).

2. Interjekcioj por esprimo de parol-agoj

Koncerne la parol-agon de **alvoko/atentigo**, la respondintoj disdividiĝis inter tiuj, kiuj elektis la malprecizan interjekcion *ho!* (43,6%) kaj la norman *hej!* (41,8%). Por 9% da respondoj, ambaŭ estas konvenaj, kaj nur 3% proponis aliajn (*fi!*, *ho!*, *fuŝ'!*, *atentu!*).

Koncerne **konsenton**, 84,8% da respondintoj elektis la plej tipan *Jes, ja!*, dum nur 3% elektis la malprecizan *aha!*, 6,1% akceptis ambaŭ, kaj 6,1% proponis alian (nome: *ho!*, *ja!*, *sendube!*, *ho*, *jes!*, *jes*, *vere!*). Kiel rimarkite antaŭe, inter la proponitaj sugestoj troviĝas pli klaraj esprimoj per adverboj (*sendube*, *jes*, *vere*) kaj la malpreciza *ho!*, kiu ŝajnas esprimi ampleksan gamon da signifoj, krom la ideo de viva sento indikita en *PAG*. Rilate **malkonsenton**, ankaŭ la tipa/norma interjekcio *tute ne!* estis la preferata de granda plejparto (83,3% da respondoj), dum la malpreciza *ve!*, kies signifo trafas la ideon de doloro/sufero, estis elektita nur de 1,5%. Aliaj 6,1% konsideris, ke ambaŭ egale bonas, kaj 9,1% preferis indiki aliajn (nome: *ne!*, *male!*, *fi!*, *nu!*, *ho ne!*). Ankaŭ ĉi tie, inter la sugestoj troveblas pli klaraj adverbaj formoj (*ne*, *male*). Okulfrapas ankaŭ la fakto ke, por tiuj du parol-agoj, la tipa interjekcioj estis adverbforma (*Jes, ja!* kaj *tute ne!*), kio eble eksplikas kial por tiuj du sencoj la plejmulto elektis ĝuste tiujn tipajn interjekciojn.

Pri la parol-ago de **instigo/kuraĝigo**, 43,9% de la respondintoj elektis la tipan/norman *hej!*, 24,2% elektis la malprecizan *hura!*, kaj konsiderinda nombro da partoprenantoj (28,8%) sugestis aliajn formojn (*daŭrigu!*, *kuru!*, *ek!*, *venu!*, *iru!*). Estas rimarkinde, ke inter tiuj sugestoj, pluraj u-verboformoj, kio eble montras la deziron esprimi pli klare la pragmatikan/komunikan agon laŭ la kunteksto.

Por montri **ekkomprenon**, 36,9% da respondintoj elektis la norman *ehe!*, sed plejparto (52,3%) ne konsideris ĝin sufiĉe kontentiga, kaj preferis indiki aliajn formojn (*aha!*, *aĥ!*, *bone!*, *certe!*, *eh!*, *ha!*, *oh-ho!*, *he!*, *ho!*, *ho jes!*, *nu!*, *ha!*). Estas rimarkinde, ke la partoprenantoj indikis multajn alternativajn formojn, kio eble signifas, la reala uzo de la lingvo ebligas plurajn manierojn esprimi ekkomprenon per vortoj.

Koncerne la komunikan agon de **dubo/hezito**, la plej tipa/norma interjekcio *hmmm!* estis elektita plej ofte (de 86,4% da respondintoj), dum 7,6% proponis aliajn formojn, ofte adverbajn (*bedaŭrinde, fek!, damne!*).

3. Lingvosento antaŭ la uzado de interjekcioj

La lasta parto de la enketilo celis montri la konscian sintenon de E-parolantoj antaŭ la uzado de interjekcioj. Mi volis kompreni 1. la emon uzi interjekciojn devenajn de la gepatra lingvo; 2. la senton pri la neceso uzi tiun vortoklason; kaj 3. la lernadon de interjekcioj en Esperanto.

Pri la eventuala uzo de interjekcioj el la gepatra lingvo, ĉirkaŭ duono de la respondintoj (50,7%) deklaris uzi tiajn vortojn malofte, dum 29,9% respondis, ke ili uzas ilin sufiĉe ofte. Nur 4,5% respondis uzi ilin ĉiam kaj 14,9% deklaris neniam uzi ilin. Pri la neceso uzi interjekciojn en Esperanto, la plejparto konsideris la uzadon de tiuj vortoj necesa (43,3% ege necesa; 37,3 iom necesa), kaj 19,4 konsideris tiun uzadon apenaŭ necesa. Koncerne la lernadon de interjekcioj, ĉirkaŭ duono de la respondintoj (46,3%) respondis, ke ili lernis ilin nekonscie per la uzo de la lingvo; dum 20,9% respondis konscie per la uzo de la lingvo kaj 23,9% konscie per lernolibroj. Tiuj rezultoj sugestas, ke tiu vortoklaso estas lernata aparte, ĉefe dum la uzado, kaj ke kompetentaj E-parolantoj toleras iom da influo de siaj gepatraj lingvoj, eble ne ĉiam konscie. Tamen, ili agnoskas ke ankaŭ por Esperanto, la uzado de interjekcioj gravas.

5. Konklude

Koncerne la esprimon de animstato, la enketilo montris, ke la plejmulto de la partoprenantoj de tiu esploro preferas la uzon de la tipaj/normaj interjekcioj, kiam ili volas esprimi doloron/suferon, malĝojon/enuon kaj riproĉon/malŝaton. Tamen, por esprimi ekmiron, la plejparto preferis indiki aliajn formojn. Tio eble sugestas, ke la tipa interjekcio por ekmiro ne estas plu konsiderata tiel viveca, kaj la uzantoj emas trovi anstataŭantojn. Tamen, por esprimi animstatojn, oni indikis ankaŭ plurajn aliajn formojn, kaj elstare adverbojn. La propono de adverbaj formoj anstataŭ tipaj interjekcioj sugestas, ke kelkaj E-parolantoj emas esprimi pli klare la cirkonstancon celitan, kaj igas la kuntekston pli preciza. Ankaŭ estas rimarkinde, ke la ĝenerala interjekcio *ho!*, kio esprimas vivan senton laŭ la gramatiko, estis indikita kiel taŭga interjekcio por esprimi ĉiujn animstatojn, kio sugestas, ke ĝi eble ne havas precizan signifon kaj estas fakte uzata kiel ĝenerala interjekcio por esprimi malsamajn animstatojn.

Koncerne la indikon de parol-agoj, la elekto de la normaj/tipaj interjekcioj ne estis tiel klare preferata de la respondintoj. Por esprimi kuraĝigon/instigon, ĉirkaŭ duono de la respondintoj

elektis la tipan formon, sed por esprimi la ceterajn komunikajn sintenojn, la plejparto indikis aliajn formojn. Nur por la parolagoj de konsento/malkonsento la enketitoj elektis kohere la tipajn formojn proponitajn, sed tiuokaze tiuj formoj estis adverbformaj (*tute ne/jes, ja*). Inter la alternativaj sugestoj elstaras la indiko de u-verboformoj kaj adverboj. Kiel por la esprimo de animstatoj, tiel ankaŭ por parol-agoj, la fakto, ke la uzantoj proponas adverbojn (kaj u-verboformojn) sugestas la emon pliklarigi la komunikan kuntekston, konsiderante, ke tiuj formoj, eĉ se uzate kiel interjekcioj, indikas pli klaran signifon ol la unusilabaj vortetoj.

Pri la lingvosento de la partoprenantoj, oni rimarkas, ke la plejparto agnoskas certan influon de sia gepatra lingvo, konsideras necese uzi interjekciojn en Esperanto, kaj lernis ilin ĉefe per la uzo de la lingvo. Certagrade, la influo de gepatraj interjekcioj eble eksplikas la proponojn de kelkaj variantoj (ekzemple: *ah/aĥ; ho/ĥo*) kaj la sugeston de formoj aliecaj al Esperanto (tiel kiel *ŭaŭ* kaj variantoj). Tamen, tiu influo ne ŝajnas sufiĉe grava, ĉar la uzado de interjekcioj grandparte spegulas la normon (ĉefe por tiuj de la unua grupo) aŭ prezentas koherajn alternativojn (por la dua grupo).

Fine, ne estas eble prezenti nun ĝeneralan konkludon pri la uzo de interjekcioj en Esperanto, sed la esploro sugestas, ke la fakta uzo de tiuj vortetoj daŭre spegulas certagrade la gramatikan priskribon, sed montras, ke kelkaj interjekcioj kiel *ho* estas uzataj en pli ampleksaj gamoj da kunteksto, kaj ke pluraj E-parolantoj preferas uzi aliajn gramatikajn formojn (adverbojn, u-verboformojn) interjekcie, celante pliklarigi la sencon. Ŝajnas necese profundigi la esplorojn pri la datumoj produktitaj per tiu enketilo, eble per pli ellaborita statistika metodo, kio estas farenda poste. Tamen, malgraŭ la variantoj, la uzo de interjekcioj montriĝis iom kohera inter la partoprenantoj de tiu esploro. La fakto, ke la tipaj/normaj interjekcioj estis prefere indikataj de sufiĉe granda parto de la enketitoj eble spegulas la ĉefan uzon de tiu lingvo en skribaj kunteksto, kaj la daŭran influon kaj prestiĝon de la gramatika normo inter E-parolantoj. La fakto, ke kompetentaj E-parolantoj kohere uzas interjekciojn tiel, kiel montris tiu esploro, estas pruvo ke Esperanto fariĝas natura kaj vivanta lingvo.

Bibliografio

- Ameke, Felix. "Interjections". En: *Encyclopedia of language and linguistics*, red. Keith Brown, Amsterdamo: Elsevier, 2006: 743-746.
- Ameke, Felix. "Interjections: the universal yet neglected part of speech". En: *Journal of Pragmatics* 18 (2/3), 1992: 101-118.
- Kalocsay, Kalman; Waringhien, Gaston. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Roterdamo: UEA, 1980.
- Neves, Maria Helena de Moura. *A gramática do português revelada em textos*. São Paulo: Editora Unesp, 2018.
- Poggy, Isabella. "The language of interjections". En: *Multimodal signals*, red. A. Esposito kaj aliaj. Berlino/Heldelberg: Springer-Verlag, 2009: 170-186.
- UEA. *Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado*. Roterdam: UEA, 2007.
- Wennergren, Bertilo. *Plena manlibro de Esperanta gramatiko*. E@I kaj La Ranetoj, 2020.
- Wierzbicka, Anna. "The semantics of interjections". *Journal of Pragmatics* 18 (2/3), 1992: 159-192.